# IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
**Jarkolekto 54 - trimonata**
**2024/2**

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

**Redakta komitato:**
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

**Kunlaborantoj de la aktuala numero:**
Duncan Charters
Renato Corsetti
Lafi Charles Diatta
Mireille Grosjean
Zsófia Kóródy
Katalin Kováts
Dennis Keefe
Stefan MacGill
Alessandra Madella
Georgi Mihalkov
Radojica Petroviĉ
Raveloharison Miora



ilei

**Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

# ENHAVO


Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) ..................................................................... 3
D. CHARTERS: *Kial kaj kiel krei interkulturan gvidilon por la UK en Tanzanio* ..... 4
Renato CORSETTI: *Lingvoj en Afriko: la progreso de frenezo* ............................... 9
Radojica PETROVIĆ: *Strukturo kaj fizionomio de la Esperanto-komunumo* ........... 13
Mireille GROSJEAN: *2024 - Jaro de Edukado*...................................................... 17
Alessandra MADELLA: *„Teo, Amo kaj la Mondo” atingis Italion* ......................... 19
*Pri la diferenco inter reta kontakto kaj rekta kontakto* (Mireille GROSJEAN) ........ 22
El la landoj kaj sekcioj (BG, DE, ES, MG, SN, RS) ............................................. 23
*Ĉu afrikanoj parolas afrikajn lingvojn?* (Renato CORSETTI) ................................. 32
Por via notlibro (Katalin KOVÁTS, Stefan MACGILL) ........................................... 34
*Intervjuo al „Esperanta Ponto”* (Alessandra MADELLA) ...................................... 36
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj ................................................................... 37


# ESTRARO DE LA LIGO

**Prezidanto:** Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

**Sekretario:** Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

**Estrarano pri financoj**: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

**Vic-prezidanto**: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

**Estrarano pri kongresoj**: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

**Estrarano**: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

**Estrarano**: Fernando PITA, R. S. Francisco Xavier, 681, bl E, ap 201, Maracanã - cep: 20550-011, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.

**Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

## Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Membroj*:**

**Duncan Charters**, Usono, Principia College, Elsah

**Renato Corsetti**, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza”; AdE[1]

**Probal Dasgupta**, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]

**Aloyzas Gudavičius**, Litovio, Šiaulių universitetas

**Boris Kolker**, Usono; AdE[1]

**Ilona Koutny**, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

**Stefan MacGill,** Nov-Zelando/ Hungario

**Aleksandr Melnikov**, Rusio, Академия Сельскохоз-яйственного Машиностроения, AdE[1]

**Radojica Petrović**, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha**, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto


**Sur la titolpaĝo:** volontulinoj de Studenta Esperanto-Klubo de Zaozhuang-Universitato agadas dum asocia foiro.

**Dorskovrile**: „Esperanta Ponto” en Tokio (Japanio) (vd. p. 36)

# Enkonduko

*Karaj legantoj,*

Okaze de la UK 2024, Tanzanio, Aruŝo, diversaj aspektoj de la lando kaj la kontinento retemiĝas en nia Esperantujo. Ekz-e, ĉi-numere, ĉefartikole, Duncan Charters, prezidanto de UEA, eksplikas por ni „Kial kaj kiel krei interkulturan gvidilon por la UK en Tanzanio”, dum Renato Corsetti, eksprezidanto de UEA, per du kontribuoj kaj defias la demandon „Ĉu afrikanoj parolas afrikajn lingvojn?” kaj sub titolo „Lingvoj en Afriko: la progreso de frenezo” malkaŝas vivo-gravajn aferojn – ne nur pri/por Afriko. Kion li diras pri la neefika malkoloniiga procezo en Afriko, rememorigas al mi trukon, kiun mahutoj aplikas por eviti forfuĝon de la elefantoj: ili ligas la elefantojn por iom da tempo al fosto per ŝnurego tiom longa, kiom ili volas difini kiel limon por la bestegoj. Post kiam la elefantoj akceptis la truditan limon, oni forprenas la ligilojn; sed, la alkutimiĝintaj elefantoj neniam eĉ provas transpasi la limon! Verŝajne multaj afrikaj gvidantoj - sed bonŝance ne ĉiuj, nek en Tanzanio - aŭ ne kredas sian liberiĝon, aŭ kial ajn por ili individue ne utilas forlasi koloniajn devigojn ekz-e la solan utiligadon de la koloniistaj lingvoj ekde la elementa edukado.

Espereble pro tiaj diskutoj, nia pionira afrika samideanaro helpos al plikonsciigo de siaj samlandanoj kaj registaroj divers-terene. Historie ni jam atestis tian efikan rolon de nia lingvo kiel katalizanto por plibonigaj ŝanĝoj, ekz-e en Ĉinio.

*Ahmad Reza MAMDUHI*

# Kial kaj kiel krei interkulturan gvidilon por la UK en Tanzanio

*de Duncan CHARTERS (Britio/Usono)*

Unu el la kernaj temoj, pri kiuj devos raporti UEA pro la administra subvencio, kiun ĝi ricevis de Eŭropa Unio por 2024, estas InterKultura Kompetento (IKK). Tiaj subvencioj celas pliefikigi la laboron de neregistaraj asocioj kaj inkluzivas subtenon de novaj iniciatoj tiucele.

La celoj de lingvoinstruado en Usono kaj aliaj landoj daŭre evoluas, kaj unu ĉefa rezulto estas signifa ŝanĝo. Multaj lingvoinstruistoj pro longjara sperto kaj ne malofte post rezistado devis konstati la fakton, ke granda proporcio de la lernantoj neniam uzos en sia vivo la lingvon, kiun ili pene alproprigis en la lernejo aŭ universitato, plejofte je nekontentiga nivelo de komunika kapablo. Pro tio multaj lernantoj post jaroj asertas, ke ili forgesis ĉion, kion la instruisto provis enkapigi al ili. Kontraste al tio evidentiĝis, ke ili povas akiri sciojn, sintenojn kaj kapablojn, kiuj restos utilaj por la tuta vivo, tiel plipravigante la lernohorojn dediĉitajn al la lingvolerna tasko.

En lingvokursoj, tradicie instruistoj inkluzivigis informojn pri la kulturo de la koncerna lingvo, sed en multaj kazoj temis pri geografio, historio kaj kulturaj monumentoj, literaturo kaj turismaj allogaĵoj. Ankaŭ tro ofte pri amuzaj diferencoj de kutimoj sen gvidado al kompreno kaj akcepto de ilia valideco kaj valoro por tiuj lingvokomunumoj. Kontraŭe, malmulte da tempo dediĉiĝis al konsciigo kaj esplorado pri la propra kulturo de la lernantoj, kaj atento al disvolviĝo de pozitivaj sintenoj pri aliaj kulturoj kaj kontaktoj kun ili. Kaj eĉ malpli al kapabligo kompreni kaj adaptiĝi al diversaj vivmanieroj okaze de kontakto kun reprezentantoj de tiuj kulturoj en la propra vivmedio aŭ alilande.

Laŭ studoj faritaj en Usono pri la sinteno de lernantoj al la popoloj, kies lingvojn ili lernis, surprizis la esploristojn konstati, ke multaj lernantoj post jaroj da lernado de alia lingvo havas pli negativan sintenon pri tiuj popoloj ol antaŭ kiam ili eklernis ties lingvon. Diversaj faktoroj kontribuis al tiu neatendita rezulto. Unu estis la manko de sukceso en lernado de la lingvo kaj manko de okazoj ĝin praktiki kun ĝiaj denaskaj parolantoj. Alia estis psikologia rezisto al lernado pri kutimoj malsamaj al la propraj, ĉar por la lernantoj ili ŝajnis nelogikaj, strangaj, ridigaj aŭ eĉ ofendaj.

Instruistoj konsciaj pri tiuj problemoj komencis kompreni, ke necesas ke la lernantoj ekhavu la okazon kompreni, ke kulturaj kutimoj estas relativaj kaj subjektivaj. Tiuj instruistoj celis por siaj lernantoj memkonsciiĝon pri la propra kultura perspektivo kaj pretiĝon por kompreni aliajn. Eĉ se apenaŭ eblas por iu ajn komplete liberiĝi de antaŭjuĝoj pri personoj malsamaj ol ni, tamen scioj, emociaj sentoj kaj konduto al aliaj estas modifeblaj. Kaj se tio okazos, la rezulto indikos signifan atingon por pli akceptemaj kaj pacaj rilatoj en la propra socio, antaŭpreparo por kontaktoj kun individuoj, kies cirkonstancoj estas tute nesamaj ol tiuj de la lernantoj.

En la Eksperimento pri Internacia Kunvivado (*Experiment in International Living*) en la usona ŝtato Vermonto, kie okazis pluraj sesioj de NASK (Nordamerika Somera Kursaro de Esperanto), mi havis la okazon partopreni en programo, kie lernejanoj loĝontaj ĉe familioj en aliaj landoj, ricevas ne nur lingvoinstruadon sed ankaŭ kulturan trejnadon. Ili lernas ne la tradician humanisman kulturon de la cellando sed la antropologian, tio estas la ĉiutagajn kredojn, supozojn kaj kutimojn, sur kiuj baziĝas tiu kulturo. Per ekzercoj de kultura ŝokiĝado ili komencas konscii, ke se ili juĝas la fremdan kulturon laŭ propraj kulturaj kriterioj, ili povas tute miskompreni kio okazas. Lernejanoj, kiuj en rolludado misinterpretis, kio okazas en alia kulturo, foje ekkoleris, eĉ emocie eksplodis, kiam iliaj interpretoj de la prezentata kultura fenomeno montriĝis esti tute malĝustaj. Post tiuj spertoj ili multe pli bone komprenis, kial ili devas labori por kompreni la kialojn de la konduto observata en la kulturo, por ke ili ne same embarasiĝu en la baldaŭ spertota realviva situacio en la vizitota lando.

Ĉu adeptoj de Esperanto bezonas tian prepariĝon? Ni ĉiuj bone interkompreniĝas, ĉu ne? Ni decidis volonte lerni komunan lingvon, kiu nin kunigas egalece kaj senantaŭjuĝe. Do tute mankos en niaj rondoj komunikaj problemoj, ĉu ne? Jes! Aŭ... ne? Kiam eŭropano parolas kun afrikano, ĉu pro sama komunikilo la eŭropano povas antaŭscii la socian formiĝon de la kunparolanto, la perspektivon, kiun tiu alportas al la konversacio, la pensojn kaj sentojn, kiuj nature pro jaroj da ensociiĝo kaj kutimiĝo kuras tra ties kapo? Hm... Ĉu povas naskiĝi konversacia defio, se eŭropano parolas kun afrika komencanto, aŭ inverse? Kaj ĉu niaj kongresanoj neniam havos kontakton kun neesperantistoj tanzaniaj? Kompreneble ne necesas en Kongreso de Esperanto! Ni ne bezonas kontakton kun la lokanoj! Hm, hm...

Vi komprenas. Kiel parolantoj de lingvo, kiu ebligas internacian kompreniĝon, ni celas maksimume akcepti kaj adaptiĝi al plej diversaj kulturoj, efike kaj laŭnorme komunikiĝi kun ĉiuj sen tro da kulturaj miskomprenoj, neĝentilaj diroj, konduteraroj aŭ ofendoj.

Precize pro tio en la aprila programo *Printempas* de la franca Kulturdomo Greziljono okazas la unua en serio de aranĝoj, kiujn vizitantoj al Esperanto-renkontiĝoj povos profiti ĝis kaj post la UK en Tanzanio. La ĉefa temo de la kurso celanta interalie prepariĝon por la KER-ekzamenoj C1 kaj C2 estas, jes, vi divenis, Interkultura Kompetento! Kaj la ĉefa projekto? Krei en konsultiĝo kun afrikaj informantoj gvidilon por partoprenontoj en la Universala Kongreso okazonta en aŭgusto en Aruŝo, Tanzanio. Kion sciu la kongresanoj por pli komforte, pli ĝentile, pli observeme, pli humile sperti la lokan kulturon? Tion ni esploros kaj priskribos. Tio ne signifos, ke ĉiuj kondutos laŭ la normoj kaj avertoj priskribotaj en la gvidilo. Scioj estas nur la komenco. Devas sekvi sintenoj kaj konsekvencaj agoj. Novaj kondut-manieroj ne aŭtomatiĝas de hodiaŭ vespere ĝis morgaŭ matene.

Ni esploris, kiuj povas esti la plej utilaj informoj, kiujn havu la ekster-afrikaj kongresanoj, kiam ili interagos kun afrikaj samideanoj kaj situacioj en la loka regiono. Ni komencis per la jenaj dek kategorioj, kaj el tiuj la kursanoj decidis en kvar grupoj kiujn demandojn ili faros al afrikaj reprezentantoj de Tanzanio kaj aliaj landoj. Ni petis, ke la afrikaj konsultatoj aldonu aliajn, kiuj ŝajnas al ili esencaj por bona orientiĝo al la loka kulturo kaj al interkonatiĝoj kun afrikanoj.

1. Kiel oni reagu al apero de nekonato? Kiuj reguloj regas pri prezentiĝoj? Ĉu oni normale povas, rajtas proksimiĝi al nekonato por sin prezenti kaj konatiĝi? Kion oni povas diri, kion oni povas demandi? Ĉu estas genra diferenco en konduto inter viroj kaj virinoj? Kiujn situaciojn evitu virinoj kaj viroj?

2. Kiam oni parolas kun nekonato, je kioma distanco oni staru? Ĉu tio varias laŭ aĝo, genro, lokaj kutimoj? Ĉu amikoj emas stari pli proksime?

3. Kion oni faras per la korpo, ĉu oni multe moviĝas? Kio pri okulkontakto? Ĉu oni ofte aŭ malofte kontaktiĝas? Se okazas okulkontakto, ĉu oni rigardu al la alparolato dum tiu parolas, aŭ ne, dum vi parolas, aŭ ne? Kien rigardi?

4. Ĉu vizaĝesprimoj estas internaciaj? En kiuj cirkonstancoj oni ridu, ridetu? Ĉu oni multe uzas mienojn aŭ gestojn por komunikado, aŭ ĉu oni dependas nur de parolataj vortoj? Krome, kio estus konsilinda por la interagoj de diversnaciaj esperantistoj?

5. Se ne-afrikano konversacias kun afrikano, kio povas esti la efiko, se la ne-afrikano post tute mallonga konversacio pardonpetas klarigante ke gravas ĉeesto en kunsido, aŭ antaŭe farita aranĝo por renkontiĝo kun amiko, kaj tuj adiaŭas?

6. Se oni en konversacio parolas pri estonta renkontiĝo, ĉu en la kulturo tio kutime okazas, aŭ ĉu ĝin facile anstataŭas aliaj poste aperantaj situacioj kaj forgesiĝas la antaŭa? Kiel indiki, ke vere gravas la specifa ĉeesto de individuo por kunsido je difinita horo? Ĉu tuja bezono de amiko aŭ familiano pli gravas ol fiksita kunsido?

7. Se ŝajnas, ke ekzistas kutimo malfrui aŭ prokrasti, ĉu tio aplikiĝas en ĉiuj situacioj aŭ nur en kelkaj? Se Kongresa programo estas organizita laŭ striktaj horoj por prezentadoj, kio necesas por prepari la kongresanojn?

8. Kiuj estas plej kutimaj konversaciaj temoj, kiuj povas esti tabuaj aŭ nedezirataj, kaj ĉu eblas diskuti pri politiko, religio, konfliktaj temoj kiel GLAT-rajtoj?

9. Kiun tonon oni celu en konversacio? Ĉu oni atendas aserteman por montri, ke vi havas sincerajn kredojn kaj opiniojn, aŭ ĉu gravas esti trankvila kaj tre tolerema pri ĉio, kion oni aŭdas, kaj tre respektema al la kredoj kaj opinioj de aliaj? Kiam oni silentu aŭ donu preferon al alia?

10. Kio estas la bazaj kutimoj pri manĝoj (daŭro, komunaj pladoj, uzo de manĝiloj, manoj)?
Pri vestaĵoj (kiel oni sin vestu por la inaŭguro de la UK, bankedo, aliaj specialaj aranĝoj, normalaj kongresaj kunvenoj, surstrate kaj en feriejo aŭ naĝejo, kio decas por viroj kaj virinoj kaj kio ne?) Kian veteron oni antaŭvidu?

La celo de la gvidilo estas maksimume utila informado por ĉiuj kongresanoj, kaj akcepteblo de la enhavo kaj por afrikanoj kaj ekster-afrikanoj (do neniu ofendo aŭ antaŭjuĝo, eĉ se necesas avertoj). Por tion atingi, la kursanoj preparu siajn demandojn, interagu pri ili kun la afrikaj informantoj, kunigu la informojn kaj aldonu novajn; post redaktado de la kursestro, ankaŭ la afrikanoj redaktu la tekston, por ke ĝi estu fidinda kaj neofenda, kaj ĉiuj interagu ĝis la tuta grupo estos kontenta. Ĉu esenca aldonaĵo ekde nun al la kongresa retejo kaj la kongresa libro? Ni esperu post takso de ĝia utilo! Sekvas kalendaro de IKK-aranĝoj dum la jaro.

**Kalendaro, Interkultura Kompetento 2024**

1. Aprilo 12-21. Greziljono, Printempas (gresillon.org/printempo) [*vd la foton sube*]. IKK ĉeftemo de la supera kurso + prelegaro (gvidis Duncan Charters). Produkto: lernantoj pli kompetentaj pri IKK, reta gvidilo pri IKK, specife kultura informiĝo kaj adaptiĝo en Tanzanio.



2. Majo 8-13. Eŭropa Esperanto-Kongreso. Prelego de Duncan Charters en SUS pri la nuntempa stato de IKK en Usono.
3. Julio 5-15. Greziljono, Maratona Esperanto-kurso, instruos Radojica Petrović kaj Ilona Koutny (inkluzivos „lingvo kaj kulturo”). Specifa atento al IKK.
4. Aŭgusto 3-10, UK en Aruŝo, Prelegoj/prezentadoj, seminario ligitaj kun la UK.
Apartaj programeroj ebligu interkulturan diskutadon kaj edukadon pri afrikaj kulturkutimoj.
5. Aŭgusto 17-24. Trejnado de instruistoj en Beogrado (stipendioj). Serbia Esperanto-Ligo (SEL), ILEI-Sekcio ILEI-RS, LIBE. Kerna temo, trejnado IKK. Duncan Charters, Radojica Petrović.
6. Aŭgusto 24-31. Itala Kongreso, ĉeftemo *Lingva kaj Interkultura Kompetento.* 4-taga matena seminario. Gvidos Ilona Koutny, Duncan Charters. Aldonaj prezentadoj: Alessandra Madella.
7. Septembro 5-8 Hispana Kongreso en la Valencia regiono. Prezentadoj

## Lingvoj en Afriko: la progreso de frenezo

*(Kontribuo al la kongresa temo de la ĉi-jara UK)*

*de Renato CORSETTI (Italio)*

Antaŭ pli ol 70 jaroj, kiam la procedo pri malkoloniigado estis nur en la komenco, en 1951, Unesko komencis okupiĝi pri instruado en la mondo kaj aranĝis kunvenon de fakuloj pri la uzo de lingvoj en lernejoj[1] kaj eldonis poste libron[2], en kiu oni povas legi tion, kion ĉiu scias, sen bezono de apartaj esploroj: la gepatra lingvo estas la plej bona lingvo por ek-instrui infanojn, ĉar ili komprenas ĝin kaj povas kompreni ĉion en ĝi.

Nelson Mandela tre brile resumis la aferon per ĉi tiuj vortoj: „*If you talk to a man in a language he understands, that goes to his head. If you talk to him*

[1]Unesco. *Meeting of experts on the use of vernacular languages in education*, Paris, 1951
[2]Unesco. *The use of vernacular languages in education*, numero 8-a en la serio *Monographs on Fundamental Education, Paris*, 1953

*in his own language, that goes to his heart*."[3], tio estas „Se vi parolas al iu en lingvo, kiun li komprenas, tio iras al lia kapo. Se vi parolas al li en lia propra lingvo, tio iras al lia koro".

La libro de Unesko prezentis ĉiujn problemojn ligitajn al starigado de lernejaj sistemoj en la lingvoj efektive parolataj de infanoj [manko de lerno-libroj, manko de instruistoj ktp.] sed ĝenerale rekomendis fari kiom eble plej multe por ekiri laŭ tiu vojo. Ĝi eĉ difinis *axiomatic* en la anglalingva eldono la fakton, ke infanoj lernas plej bone en sia gepatra lingvo. Nun, laŭ la Plena Ilustrita Vortaro, aksiomo estas: „Aserto, rigardata kiel evidenta per si mem aŭ ĝenerale akceptata". Cetere la libro temis pri la tuta mondo, ne nur pri Afriko.

Sed en Afriko tiu aksiomo estis akceptata nur de kelkaj plej progresemaj politikistoj. Mi jam citis Nelson Mandela kaj nun povas aldoni Nyerere [Njerere] el Tanzanio. Tiucele mi prenas kelkajn frazojn el verko neaperinta de Nino Vessella [vesela][4]:

„Grava evento estas la parolado kiun faris Prezidanto Njerere okaze de la unua jardatreveno de la sendependiĝo. En tiu parolado li informas pri la starigo de Ministerio pri Junularo kaj Kulturo, kaj li invitas ĉiujn civitanojn engaĝi sin en la evoluigo de la nacia kulturo. En la afrikaj ŝtatoj kiuj fariĝis sendependaj, la eŭropaj lingvoj ŝajnis neŭtralaj, male en Tanzanujo la sŭahila lingvo estis akceptebla por la plejparto de la popolo ĉar ĝi estis parolata de 90% de la loĝantaro.

Danke al ĉi tia situacio en la Konstitucio de la jaro 1962-a estas klare skribite ke la oficialaj lingvoj de Tanzanujo estas la sŭahila kaj la angla. Komenciĝas la „konstruo" de nacia kulturo sur la bazo de ĉiuj lokaj kulturoj esprimataj de la proksimume cent lingvoj parolataj en la lando."

Tamen en Afriko politikistoj ĝenerale preferis aŭskulti alispecajn konsilojn, tiujn de la eksaj koloniantoj, kiuj respondecis pri la misdivido de Afriko dum la akapar-konkurso pri Afriko en la 19-a jarcento kaj nun pro tiu misdivido komprenigis al afrikanoj, ke ili ne povas fari ion alian ol simple pluuzi la „neŭtralajn eŭropajn  lingvojn". Tio solvas ankaŭ la problemon de lernolibroj: sufiĉas ilin aĉeti en Eŭropo. Kaj ankaŭ la problemo pri instruistoj estos pli facile solvata, ĉar la eŭropaj ministerioj pri edukado volonte sendas

---

[3]Citita en *https://scholar.harvard.edu/pierredegalbert/node/632263*
[4]Nino Vessella (2023), *Esperanto kompare kun la sŭahila lingvo – kontrast-lingvistikaj kaj socilingvistikaj aspektoj*. Verko neaperinta, ricevita de la aŭtoro.

trejnistojn. Kompreneble la universitatoj pluuzu eŭropajn lingvojn. Oni ne improvizas magie la superan kulturon en afrikaj lingvoj.

Neniu komprenis, ke temas pri apliko de politiko decidita antaŭ la komenco de malkoloniiĝo. En 1943 Winston Churchill [Ŭinston Ĉeĉil] faris faman paroladon en la universitato de Harvard [Haved] okaze de la ricevo de honora titolo.[5] Tiu parolado estas ofte citata pro la peceto kiu sekvas (nia traduko kaj nia aldonita emfazo):

„Ni antaŭeniru kiel pri aliaj demandoj kaj pri aliaj decidoj similaj laŭ celo kaj efiko – ni antaŭeniru sen malbonvolo al iu ajn kaj kun bona volo al ĉiuj. Tiaj planoj proponas multe pli bonajn kompensojn ol forpreni provincojn aŭ landojn de aliaj popoloj aŭ ekspluatante subtreti ilin. **La imperioj de la estonta tempo estos la imperioj de la menso**....Antaŭ kelkaj monatoj mi konvinkis la Britan Ministraron starigi ministran komitaton por pristudi la *Basic English* kaj raporti pri ĝi. Jen konkreta plano."

Tiu plano sonoras, laŭ mi, kiel la mortosonorilo por la lokaj afrikaj lingvoj kaj samtempe pri la egalecaj celoj de la Esperanto-movado. Fakte post la dua mondmilito dum okazis laŭgrade la malkoloniiĝo en Afriko kaj en la mondo, ekestis Unuiĝintaj Nacioj kaj la tuta kunstelaro de agentejoj de UN, kiuj praktike dum jardekoj estis nur ludilo en la manoj de la okcidentaj potencoj, kiel oni nun klare agnoskas, ekzemple:

„En la jaroj 1980-aj kaj 1990-aj la Internacia Mona Fonduso, IMF, kaj la Monda Banko donis pruntojn al malriĉaj landoj, kiuj postulis ŝanĝojn en ilia ekonomia politiko, kiuj emis puŝi ilin al libera merkata ekonomio... Malbonŝance la plejmulto el la prunto-ricevintoj montris nulan aŭ malpozitivan kreskon kaj estis nekapablaj repagi la pruntojn; malgraŭ tio la IMF kaj la Monda Banko pludonis al ili novajn pruntojn, puŝante ilin plue kaj plue en ŝuldojn".[6] Ĉi tiu parto de teksto estas nur unu el la miloj troveblaj kaj ni elektis kaj tradukis ĝin pro ĝia klareco.

---

[5] Tradukita el: http://www.winstonchurchill.org/resources/speeches/1941-1945-war-leader/420-the-price-of-greatness-is-responsibility

[6] https://humanjourney.us/economy/multilateral-and-bilateral-aid/
In the 1980s and 1990s, the IMF and World Bank gave structural adjustment loans to poor countries which mandated changes in their economic policies that would encourage them to move to a free market economy. ....Unfortunately most of the recipient countries showed zero or negative growth and were unable to pay back their loans; nevertheless, the IMF and WB continue to give them new loans, forcing them further and further into debt.

Kiam temas pri la Monda Banko oni devas aparte noti ke en la sama periodo ĝi daŭre dum negocado de pruntoj por konstrui lernejojn, intervenis por konsili, ke unu el la kondiĉoj estas la instruado per la angla, la lingvo de efikeco kaj produktado, kaj nur post jardekoj da kritikoj en 2021, ĝi abrupte tute ŝanĝis sian politikon, per aperigado de raporto, kies titolo estis: „*LOUD AND CLEAR: Effective Language of Instruction Policies For Learning - A World Bank Policy Approach Paper*" (LAŬTE KAJ KLARE: Efikaj politikoj pri instru-lingvoj por lerni – Raporto pri politiko-aliro de la Monda Banko). Ni tradukas mallongan pecon el komuniko de la Monda Banko de la 14-a de julio 2021:

„Infanoj lernas plie kaj pli verŝajne restas en la lernejo, se oni instruas ilin en lingvo, kiun ili parolas kaj komprenas. Tamen oni taksas, ke 37 elcentoj de la lernantoj en landoj kun malalta aŭ meza enspez-nivelo estas devigataj lerni en malsamaj lingvoj kaj tiel oni metas ilin en signifan malavantaĝon dum ilia lerneja vivo kaj oni limigas ilian lerno-potencialon.

Laŭ la nova raporto de la Monda Banko „Laŭte kaj Klare...", efikaj politikoj pri la instrulingvo estas centraj por malpliigi la Lerno-malriĉecon kaj por plibonigi aliajn lerno-rezultojn, justecon kaj inkluzivecon. Instruado okazas per lingvo – parola aŭ skriba - kaj la lernado de legado kaj skribado fare de infanoj estas esenca por lerni la aliajn lernejajn temojn. La raporto Laŭte kej Klare diras tion simple: tro multaj infanoj estas instruataj en lingvo, kiun ili ne komprenas, kio estas unu el la plej gravaj kialoj pro kiu multaj landoj havas tre malaltajn lerno-nivelojn."[7]

Do, nun ankaŭ la Monda Banko samopinias, kun Unesko, kiu jam diris tion en la 1950-aj jaroj kaj kun ĉiuj lingvistoj, kiuj okupiĝas pri afrikaj lingvoj kaj jam dum jardekoj diris la samon[8]. Sed afrikaj politikistoj ankoraŭ

[7] Nia traduko el https://www.worldbank.org/en/topic/education/publication/loud-and-clear-effective-language-of-instruction-policies-for-learning "According to a new World Bank report Loud and Clear: Effective Language of Instruction Policies for Learning, effective language of instruction (LoI) policies are central to reducing Learning Poverty and improving other learning outcomes, equity, and inclusion.
Instruction unfolds through language – written and spoken – and children learning to read and write is foundational to learning all other academic subjects. The Loud and Clear report puts it simply: too many children are taught in a language they don't understand, which is one of the most important reasons why many countries have very low learning levels."

[8] Pro la enorma literaturo pri ĉi tiu temo, ni citas nur unu tekston: *Language ideologies and social positioning: the restoration of a "much needed bridge"*,

preferas aŭskulti tiujn, kies intereso ne estas la feliĉo de afrikaj infanoj aŭ la evoluo de afrikaj socioj, sed la pluigado de la nuna situacio de neegaleco kaj la plutenado de la privilegioj de la afrikaj elitoj. Mi pensas, ke venis la tempo ĉesigi la frenezajn decidojn pri lingvoj en Afriko kontraŭ la afrikanoj kaj favore al eksterafrikanoj. Ĉiuj esperantistoj kaj ĉefe la afrikaj esperantistoj devus diri: Venis la momento respekti la rajtojn de la afrikaj infanoj lerni per sia gepatra lingvo. Afrikaj lingvoj estas same valoraj kiel ĉiuj aliaj. Ĉiu parolu sian lingvon ĉe si kaj por interafrika egaleca dialogo oni uzu la mondan lingvon Esperanto, la lingvon de espero.

## Strukturo kaj fizionomio de la Esperanto-komunumo

*de Radojica PETROVIĈ (Serbio)*

Serbia Esperanto-Ligo (SEL) entreprenis plurpaŝan enketadon kun la celo difini strategion de plipopularigo de Esperanto. La unua paŝo celas tiujn, kiuj jam havas spertojn el lernado de Esperanto. La dua paŝo celos sintenojn kaj motivojn de neesperantistoj. SEL havas por tio fakan helpon de prof-ino Nada Strugar el la Filozofia Fakultato de la Universitato de Beograd. Por la unua paŝo ŝi kunmetis, interkonsulte kun SEL, enketilon kun kvardeko da demandoj al esperantistoj pri, interalie: aĝo, sekso, eduknivelo, loĝloko, gepatra(j) kaj aliaj lingvoj uzataj, la tempo kaj cirkonstancoj de la unua kontakto kun Esperanto, la motivoj kaj influfaktoroj de la decido eklerni la lingvon, ĝiaj uzoj kaj utileco, rilato al Esperanto-organizoj kaj opinio pri iliaj aktivaĵoj, sinteno pri disvastigado de Esperanto kaj ideoj pri plisukcesigo de ĝia instruado kaj ĝia plividebligo en la socio ĝenerale.

La enketilo estas tradukita en Esperanton kaj elektronike diskonigita tra Esperantujo mondvaste. Al la serblingva demandaro respondis 65 enketatoj el Serbio kaj 4 el aliaj landoj. En Esperanto venis 271 responditaj enketiloj el ĉiuj kontinentoj, tamen nur unu el Aŭstralio kaj relative malmultaj el Azio kaj Afriko. La respondoj estas studataj kaj tio daŭros iom, tamen eblas jam prezenti kelkajn unuajn indikojn aŭtomate riceveblajn per statistikaj programoj. En la ĉi-sekva tabelo estas montrita la strukturo de la responditaro laŭ kelkaj indikiloj, paralele por la respondintoj en Eo kaj en la serba.

---

International Journal of the Sociology of Language, 10.1515/ijsl-2020-0094, 2021, 272, (1-12), (2021).

**Strukturo de la Esperanta parolkomunumo**


| **Laŭ la aĝo** | | Eo | | La serba | |
|---|---|---|---|---|---|
| <20 jaroj | <60 j. | 3% | 49 % | 3% | 55% |
| 20–30 | | 6% | | 9% | |
| 30–40 | | 8% | | 10% | |
| 40–50 | | 17% | | 16% | |
| 50–60 | | 15% | | 17% | |
| 60–70 | >60 j. | 27% | 51 % | 21% | 45% |
| >70 | | 24% | | 24% | |
| **Laŭ la sekso** | | | | | |
| Vira | | 69% | | 43% | |
| Ina | | 30% | | 57% | |
| Alia | | 1% | | | |
| **Laŭ la eduknivelo** | | | | | |
| Malpli ol universitato | | 30% | | 32% | |
| Universitato | | 43% | | 41% | |
| Magistro, doktoro | | 27% | | 27% | |

| **La aĝo, kiam la enketito eklernis Esperanton** | | |
|---|---|---|
| Denaske | 3% | |
| <15 j. | 11% | **34%** |
| **15–20** | **31%** | **27%** |
| **20–30** | **31%** | **16%** |
| 30–40 | 11% | 8% |
| >40 j. | 13% | 15% |

La demando pri motivoj por lerni Esperanton ricevis tre diversajn, diverse longajn kaj diverse detalajn respondojn. Necesas sistemigi, klasifiki kaj nur poste statistiki ilin. Similo validas por la demandoj pri utiloj de Esperanto, propra kontribuo al ĝia disvastigado, opinioj pri tio kiel plisukcesigi la instruadon kaj utiligadon de Esperanto. Tamen la statistiko de laŭskalaj respondoj al demandoj pri kelkaj konkretaj influfaktoroj de la decido lerni Esperanton prezenteblas grafike. Jen, porilustre, grafikaĵoj pri nur du demandoj el la enketo en Esperanto, kiuj, kune kun la ceteraj, sugestas indikojn por varbstrategio por novaj kursanoj.


*Demando:* Bonvolu pritaksi sur la skalo ekde 1 (Neniom) ĝis 5 (Tre) kiom malalta kosto aŭ nepagendo de Esperanto-kurso influis vian elekton lerni la lingvon?

*Statistiko de la respondoj*



*Demando:* Dum la lernado de Esperanto, kiom alireblaj por vi estis instrumaterialoj kaj didaktikaj rimedoj (lernolibroj, aŭdmaterialoj)?

*Statistiko de la respondoj*




Multe pli da fidindaj kaj uzeblaj konkludoj rezultigos la plena analizo de ĉiuj respondoj al ĉiuj demandoj kaj korelacioj inter ili. Unu el la konkludoj devus respondi pri: kiuj celgrupoj el la neesperantista publiko estas plej ŝancodonaj, al kiuj koncentriĝu nia varbagado por akiri novajn esperantistojn. Kaj ankaŭ: kion prezenti al ili, per kiuj motivoj kaj argumentoj varbi?

Leviĝas ankaŭ aliaj demandoj, kiuj ne trovos respondojn en la kolektita enketmaterialo, sed kiujn sugestas la strukturo de la enketitaro. Kial tiom malmulte da virinoj, junaj esperantistoj, afrikanoj kaj azianoj respondis? Kiuj estas la plej bonaj vojoj por atingi tiujn celgrupojn? En kaj ekster Esperantujo.

La sekva paŝo de la enketado estos serblingva (kaj alilingva se iu alia krom SEL volos) enketo kun neesperantista publiko. La celo estos prisondi opiniojn, sintenojn, antaŭ-sciojn kaj -juĝojn, motivojn de potencialaj celatoj de informa kaj varba agado. Sur tio, plu, baziĝu plibonigo de la inform- kaj varb-strategio.

# 2024 - Jaro de Edukado

*de Mireille GROSJEAN (Svislando)*

Tian temon por nia nuna jaro decidis Afrika Unio, landaro, kiu kunigas ĉiujn afrikajn ŝtatojn (55), krom ses ŝtatoj, kie okazis en 2023 puĉoj. Vidu Afrika Unio - Vikipedio (wikipedia.org)

Edukado, **bona edukado por ĉiuj**, signifas konstruadon de lernejoj, ne tro grandajn klasojn, adekvatan salajron por la instruistoj. Konstruante lernejon, oni ne forgesu konstrui necesejojn, ĉar se tia necesa loko mankas, knabinoj ne venas al lernejo. Gravas havi taŭgajn lernilojn, lernolibrojn, kiuj kongruas kun la loka kulturo kaj la lokaj bezonoj. Post la sendependiĝoj en la sesdekaj jaroj oni trovis dum jaroj lernolibrojn el la kolonia lando; la verkado de propraj lernolibroj bezonis tempon kaj financadon.




La kutimo en Afriko kaj en multaj aliaj landoj estas postuli, ke gelernantoj venu al lernejo en uniformo. Tiu farmaniero malaperigas la sociajn diferencojn. Sed multaj infanoj ne povas ricevi enlernejan edukon pro manko de mono por pagi la uniformon. Okazas, ke iu infano iras al lernejo matene

kun ŝuoj, kaj posttagmeze la frato uzas la samajn ŝuojn por iri al lernejo; do ĉiu infano frekventas la lernejon je 50%.

Tre gravas por la gepatroj havigi al siaj idoj bonan edukadon. Pro tio ili havas altajn atendojn al la instruisto. Foje la rilatoj inter gepatroj kaj instruisto estas streĉaj, malfacilaj, pro la esperoj kaj ambicioj de la gepatroj.

La instruistoj havas grandajn klasojn; mi aŭdis pri klasoj kun 200 gelernantoj en Ĉado. La disciplino estas tre severa. En Burundo, kiam mi instruis tie en 2011, mi aŭdis kriojn en apuda klasoĉambro. Mi paliĝis… Mi demandis al miaj gestudentoj: Kio okazas? Respondo venis: la instruisto frapas la lernantojn. Ŝokita mi silentis. Demando venis: Kiel vi povas devigi viajn lernantojn obei, se vi ne frapas ilin? Mi devis pripensi… Mi povis doni al ili punon, kiel verkadon de pliaj hejmtaskoj. Mi povis venigi ilin dum libera duontago en la lernejon, sed tio povus esti konsiderata privilegio… En familio oni povas puni infanon ne donante al li/ŝi deserton. Sed kiam eĉ manĝo mankas, tia strategio ne eblas.



En Benino mi ĉeestis lecionon en elementa lernejo. La instruisto faris demandon, montris infanon, kiu devis ekstari kaj respondi. Se la respondo estis erara, la infano devis resti staranta dum kelkaj minutoj. Honto!

La gelernantoj kopias tion, kion la instruisto skribas ĉe la tabulo. Ofte ili ripetas koruse, ofte ili kantas. Eble ni en Eŭropo ne sufiĉe kantas…

Mi ne povis enprofundiĝi en la enhavon de la afrika instruado. Mi scias kaj tre bedaŭras, ke la enhavo de la instruado estas en la manoj de politikistoj. Ne devus esti tiel. Mi memoras pri Eugène de Zilah (1939-2020) esperantista poligloto, kiu proponis kvaran povon nomota „kultura povo" (apud la tri povoj en demokratio, t.e. justica, plenuma kaj leĝdona povoj) el saĝuloj, kiuj desegnu la konturojn de la scioj transdonotaj al la infanoj kaj junuloj en la lernejoj. Tia ideo plaĉas al mi. Alia temo estas, ĉu instrui en la loka afrika lingvo aŭ en la kolonia lingvo, la oficiala. Vasta temo por posta teksto.

## „Teo, Amo kaj la Mondo" atingis Italion

*de Alessandra MADELLA (Italio)*

Nia publiko certe rememoras la revolucion, kiun „Teo kaj Amo" portis al Esperantujo. Tiu tutmonda konkurso de mallongaj videoj pri teo, kun la forta subteno de Pekina Esperanto-Asocio kaj Ĉina Radio Internacia (nun Ĉina Komunikila Grupo), estis la stimulo por multe da kreemaj samideanoj memlerni filmofaradon. Tiu evoluo multe gravas en mondo, en kiu ankaŭ lingvolernado estas pli kaj pli vida kaj la atento de junuloj pri aliaj kulturoj pli daŭre kapteblas per interesaj bildoj. Tianjin-a Esperanto-Asocio (TEA) disvolvis la interkulturan aliron de tiu unua sperto, varbante internaciajn kontribuojn por foto-ekspozicio kun la nomo „Teo, Amo kaj la Mondo."

Jam dum la jaroj de la pandemio ĝi turneis en diversaj landoj, inkluzive Uzbekion kaj Orient-Eŭropajn landojn. Ĝi tiel gajnis la universitatan subtenon de la Scienca kaj Teknika Universitato de Tianjin kaj de la Agrikultura kaj Foresta Universitato de Zhejiang, en la persono de la direktorino de ĝia Tea Bazo, profesorino Wang Xufeng. La asocio de Tianjin afable donacas al la organizantoj materialojn pri Ĉinio kaj teo, lasante ilin tamen disvolvi kiel eble plej multe siajn lokajn prioritatojn. Tiamaniere, la evento-serio koloriĝas ĉie per malsamaj koloroj, bone montrante la bunton kaj belon de ĉiuj kulturoj, inkluzive de la minoritataj.

La 10-an de februaro 2024 por la unua fojo „Teo, Amo kaj la Mondo" atingis Italion. La Esperanto-Asocio „Giorgio Canuto" de Parmo organizis tutan matenon da prelegoj, spektadoj kaj lecionoj, plenigante la elegantan konferenc-salonon de la Saveriana Fondaĵo, kiu ankaŭ gastigas belan Muzeon pri Ĉina Arto kaj Etnografio. Ĉeeste malfermis la prezentadon la Pastro Gustavo Zanoli, la prezidanto de la asocio kaj membro de ILEI. Sendis

bonvenajn salutmesaĝojn Lin Liŝa, prezidantino de TEA, profesorino Wang Xufeng kaj Laura Brazzabeni, estraranino de ILEI kaj prezidantino de Itala Esperanto-Federacio (FEI), kiu parte subtenis finance la eventon.



*Patrizia Rivaldi verŝas teon*

Krom la videoj de Tianjin pri la pretigado kaj gustumado de teo en diversaj kulturoj, grandan intereson vekis la dokumentaj filmoj pri la nacio Hani fare de la junaj reĝisorinoj Tang Jingchuan kaj Zheng Nanxi. Danke al ili la spektantoj povis merĝiĝi en la vilaĝan vivon de la provinco Yunnan en sudokcidenta Ĉinio kaj ĝui la ritmon de la loka lingvo, helpe de Esperantaj subtitoloj. Tre atendata estis la unua provo de „Vojaĝo al la Oriento", la video-kurso de MA-GA-Filmoj pri la mondo de ĉina teo fare de Maximiliano Garcia kaj Wei Ningna. Tio estas interalie, ĉar Max estas membro de nia loka grupo. Li fakte enamiĝis je Esperanto dum nia evento „Teo kaj Amo" en la Ĉina Muzeo en 2020 kaj daŭre partoprenis en niaj retaj renkontiĝoj dum la pandemio, samtempe komencante sian viglan agadon por ILEI.

„Vojaĝo al la Oriento" havas novigan koncepton, ĉar ĝi celas doni praktikan celon al junuloj interesataj pri Esperanto-lernado, prezentante specifan laboran kampon. Ĝi samtempe propagandas Esperanton en la tea mondo, ludigante ne-esperantistojn en la internacia lingvo, post rapida

klarigo de la bazaj reguloj kaj prononco. La filmado jam ekis en diversaj partoj de Yunnan kaj Guandong kaj la mojosa afiŝo de la serio montras ĥameleonon, kiu atente rigardas al Max antaŭ montara pejzaĝo. Ne povis manki kompreneble alia ideo de Max, la Homa Ĉeno de ILEI, kiu jam atingis la naŭan epizodon, sed kies filmado ekis de la Parma grupo.

Franco Bressanin kaj Tarcisio Bonotto de la Esplor-Instituto PROUT portis nin al la mondo de barata teo kaj meditado, prezentante la ekonomian penson de tieaj pensistoj por pli justa socio. Barato estis ankaŭ unu el la teo-produktantaj landoj, kies flagoj estis interese prezentataj de Cristina Bollini. La loka poetino Caterina Parca (plumnomo de Giorgia Albertelli) ĉarmis la spektantojn per la legado de siaj poemoj, tradukitaj en Esperanton por *La Turka Stelo*. Sed certe la kernaj momentoj de nia mateno estis reĝisorataj de Patrizia Rivaldi, kiu organizis en apuda saloneto elegantan kaj delican gustumadon de teoj kaj dolĉaĵoj el ses landoj (Barato, Ĉinio, Italio, Japanio, Kenjo kaj Senegalo), prezentante detalajn klarigojn pri ingrediencoj kaj preparad-manieroj. Ŝi ankaŭ venigis Moussa Lo, talentan senegalan instruiston de afrikaj dancoj, kiuj kaptis per siaj ritmoj junulojn kaj malpli junajn kuraĝulojn. Tiel sukcese finiĝis nia evento, kiu ricevis laŭdojn pro sia interesa mult-kultura enhavo kaj la inteligenta prezentado de teoj fare de Patrizia.

Granda ĝojo por ni estis la partopreno de samideanoj el la najbara regiono Lombardio, inter kiuj troviĝis la eksa prezidanto de IEF Luigi Fraccaroli kaj la pakistana instruisto Mian Salam Shany. La direktorino de la Ĉina Muzeo, Chiara Allegri, pozitive rimarkis la similecon de celoj inter la etnografia aliro de la Muzeo kaj la interkultura aliro de Esperanto, por reciproke pliigi la sciojn inter diversaj gentoj kaj tiel malpliigi malamojn kaj timojn. Ŝi malfermis la vojon al pliaj kunlaboroj, inkluzive eblan ekspozicion pri la historio de Esperanto en Ĉinio kun la Esperanto-Muzeo de Zaozhuan-Universitato. Simile la Instituto PROUT nun estas esploranta kiel inkludigi lecionojn de la internacia lingvo kadre de peto por Eŭropa projekto. Finfine la intereso pri la revuoj de ILEI (*IPR* kaj *Juna Amiko*), kiuj libere obteneblis dum la evento, kaj la plaĉe engaĝa sinteno de la mateno instigis kelkajn junulojn demandi pri ĉeestaj kursoj por komencantaj. Tiel esperebl ankaŭ la semoj de nia evento iel kontribuos al ilia malfermo kaj al la daŭra rolo de Parmo kiel „varma” urbo por Esperanto.

# Pri la diferenco inter reta kontakto kaj rekta kontakto

Ekde la pandemio ni abunde uzas komputilon kaj la reton por niaj kursoj, renkontiĝoj, debatoj, estrarkunsidoj. Ĉiuj progresis en la uzo de tiu vehiklo, eĉ la plej maljunaj esperantistoj. Ni kutimas vidi la vizaĝon de la aliaj; iu povas rideti aŭ paroli aŭ fari ian signifoplenan movon per la vizaĝo aŭ la manoj, aŭ montri iun objekton. Oni ne scias, ĉu iu ĉe la ekrano estas alta aŭ malgranda. Iu povus esti en rulseĝo. Oni ankaŭ povas malŝalti la kameraon kaj nur aŭskulti. Do laboras nia vido kaj nia aŭdkapablo. La tri aliaj sensoj dormas. Ni ne povas tuŝi la aliajn personojn, meti manon sur brakon aŭ ŝultron por saluti, atentigi aŭ korekti. Oni nenion flaras nek ricevas sur la lango ion por gustumi. Do la kontakto estas ne fizika kaj nur parta.

Sed alia aspekto kreas grandan diferencon inter rekta kunestado konkreta, kaj kontakto virtuala. Tion mi malkovris aŭskultante la rakonton de samideano. Jen: „*Se la maljunuloj kiel ni sekvis perpoŝtajn kursojn kaj grup-lernadon ĉe Esperanto-kluboj, ekzistas nun lernantoj, kiuj ekskluzive lernas la lingvon tra la reto danke al lernu.net, YouTube (Jutubo) eble, kaj aliaj fontoj. Ĉirkaŭ tablo de gastoj mi foje vespermanĝis apud nekonato, kiu tre bone povis paroli kaj respondi demandojn, kvankam li estis, laŭdire, komencanto. Sed mi ja surpriziĝis pro detalo. Post kiam li dankis min pro transdonita panopeco, mi respondis: „Nedankinde”. Li ne tuj komprenis... mi devis rediri malrapide, kaj li analizetis por si mem tiun konatan vorton:*
*– ne – indas – danki? Ah, jes, jes!*
*– Hm?! Vi jam tiom bone parolas! Ĉu vi* <u>*neniam*</u> *aŭdis tiun respondon ĝis nun?!*
*– Nu... dankon pro la komplimento. Sed jes ja, estas nun la unua fojo entute, kiam mi fizike renkontiĝas kun Eo-parolantoj kaj povas uzi miajn lernitaĵojn! Ho ve! Tiu novaĵo frapis mian menson. La antaŭ-reta epoko de mia propra lernado subite aperis al mi malnova kiel Zamenhof mem!*”

Tiu samideano komparas sian senretan lernadon kun la nun ebla perreta lernado. Sed alia aspekto aperas: oni povas konstati, ke la retaj kontaktoj ebligas debatojn, rakontojn kaj diskutojn, diversajn transdonojn de informoj, eĉ gramatikajn klarigojn, sed la paroloj, esprimoj, surprizaj krioj kaj ligaj vortoj eksterfrazaj, kiuj kutimas aperi en iu ĉiutaga dialogo, ne aŭdiĝas en la virtualaj kontaktoj. Ilin oni akiras nur en veraj rektaj fizikaj kontaktoj. Do ni ade renkontiĝu, invitu kaj gastigu samideanojn, partoprenu kongresojn! Vivu nia lingvo!

*Mireille Grosjean, Svislando*

# El la landoj kaj sekcioj…

## Bulgario

**Internacia Literatura E-a Konkurso „Hristo Gorov-Hrima" – 2024**
Hristo Gorov-Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian E-an Literaturan Konkurson „Hristo Gorov-Hrima". En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por ***rakonto kaj eseo.***

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton kun supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman - 12 punktaj.

**La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.**

*Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2024 al Georgi Mihalkov, prezidanto de la ĵurio, retadreso: modest.mihalkov@gmail.com*

## Germanio

### Lernu E-on en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo - SEP-9 – Somera Esperanto-Perfektigo. Specialaj 1-semajnaj someraj kursofertoj de Esperanto-Centro Herzberg

1. 05.-13.07.2024 kaj
2. 13.-21.07.2024 aŭ
3. 02.-11.08.2024 !!!

**1. Intensaj E-lingvokursoj**

- *Komencantoj* (A1-A2)
- *Progresintoj* (B1-B2)

**2. 1-semajnaj instrukapabligaj klerigmoduloj por instruemuloj (B2-C1): observado de instruado, instrupraktiko sub gvidado de spertulo**

**Programo:**
*Ĉiutage: 6 instruhoroj*
*Posttagmeze: Vizitoj, ekskursoj, naĝado, biciklado, promenado, festoj, tamtamado ktp.*
*Vespere: Filmoj, muziko, ludoj, babilado, literaturo, ekskursoj, rostadfesto*

**Kostoj**
*Kurskotizoj: 1 semajno 170 € – 14 tagoj = 290 €*
*Rabatitaj kotizoj: ekz. por studentoj! GEA-membroj: 20%, EGS-klubmembroj: 35% rabato*

**Tranoktebloj:** *Ni peras por vi!* (*kostoj po persono kaj nokto)*
1) *favorpreza Esperanto-tranoktejo: 30,00 €*
2) *hotelo (2-4-stela, kun matenmanĝo): 40-70 €*
3) *privata apartamento (se min. 2 personoj): ĉ. 30 €*
4) *en propra tendo: senkosta*

**Aliĝo**: esperanto-zentrum@web.de, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, T: 0049/5521 5983.

### Invito al: Jarĉefkunveno de AGEI

La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) invitas ĉiujn siajn membrojn al la ĉi-jara ĉefkunsido, okazonta en la Germana Esperanto-Kongreso resp. Eŭropa Esperanto-Kongreso (8-12.05.2024) en Strasbourg. La AGEI-kunveno okazos inter 09-10h en dimanĉo, la 12an de majo 2024 en la salono Amfiteatro 3 (247) de la kongresejo: Université de Strasbourg, Le Patio, 22 Rue René Descartes, F-67000 Strasbourg. Bonvenon al ĉiuj membroj kaj interesiĝantoj! http://agei.esperanto-urbo.de/, menupunkto Alvokoj.

## Hispanio

### Ni venos, ni vidos, ni Valencios: La Hispana Landa Kongreso, 2024 - Valencia, Cheste

La ĉi-jara Landa Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio, okazos en la regiono Valencio, kie partoprenantoj kongresos dum kvar tagoj ĉe la „Universidad Laboral" de Cheste, kaj poste povas laŭplaĉe postkongresi dum

ĝis 14 tagoj en la regiono Valencio. La datoj por la Kongreso estas de la 5a ĝis la 8a de septembro, kaj tiuj de la Postkongreso estas de la 9a ĝis la 22a de septembro.

AMO-Seminario: instruado kaj lernado. En la centro de la programo estos nova AMO-Seminario sub la gvido de Stefan MacGill, kaj aranĝita de Duncan Charters kaj Dennis Keefe, kune kun Ruben Fernández de la Universidad UNED, kaj Laura Brazzabeni de Italio. La Seminario ĉefe rilatos al temoj, kiuj interesas ILEI-anojn: lernado, instruado, kulturo kaj internacia komunikado.

Malaltaj kotizoj kaj kostoj por ne-hispanoj kaj junuloj. Por loĝado, abundaj studentaj dormoĉambroj disponeblas surloke je 30 € por privata, dulita ĉambro. Notu, tamen, ke la banĉambroj estas ĉe la fino de la loĝeja koridoro. Se du kongresanoj en unu ĉambro, po 15 € ĉiunokte. La studenta restoracio disponeblos kun manĝoj de 10 € averaĝe, kaj kun matenmanĝoj de ĉirkaŭ 2 €. Kotizoj kaj prezoj por eksterlandanoj kaj junuloj estas speciale favoraj en la unua aliĝo-periodo: nur 15 € (23 € en la lasta periodo), kaj por akompanantoj nur 10 €. Por plia, detala informo kaj por aliĝi, interesatoj povas viziti la retejon *kongreso.esperanto.es*

Post-Kongreso, kiu longas 14 tagojn: tre alloga por eksterlandanoj. Speciale planita por internaciaj kongresanoj, kiuj volas pli longe resti en la regiono Valencio, praktikante sian Esperanton, la Postkongreso daŭros ĝis 14 tagojn! Postkongresaj kotizoj estos 65 € en la unua periodo (95 €, en la lasta). Vi povas partopreni unu tagon, du tagojn, pliajn, aŭ eĉ la tutan dusemajnan periodon. Vi povas decidi partopreni aŭ ne, surloke dum la kongreso. Dum ĉiu ekskurso ni fokusiĝas pri valencia kulturo: vi konas la valenciajn kafejojn kaj trinkejojn, la valenciajn restoraciojn; vi povas gustumi la famajn trinkaĵojn kaj manĝaĵojn de Valencio: Akvon de Valencio, „Horchata-n" Paelon.

Famaj urboj, ĉarmaj vilaĝoj, ĉiam tradiciaj, valenciaj lokoj. Entute estos 28 elekteblaj ekskursoj kaj vizitoj ne nur en la historia Valencio, sed ankaŭ en tre interesaj partoj de la regiono: la Albufera (la plej granda lago de Hispanio), El Palmar (fama pro la verkoj de Blasco Ibañez), la Devesa (natura marbordo), Sagunto (romiana teatro), Cullera (la ferio-loko de la Valencianoj), Gandia (plaĝo, historio kaj Esperanto-Kafejo), Alboraia (la fama hispana „horchata kaj fartons"), Castellón (signifa urbo), Cheste (la

hispana, historia „Esperanto-Urbo”), Buñol (la urbo de la mondfama tomato-batalo), Alcira (historia urbo), Moixent (muzeo de arkeologio), Xativa (kastelo), kaj kiam eblas, al lokaj festoj en valenciaj vilaĝoj (unikaĵoj en Eŭropo). Detaloj ĉe *kongreso.esperanto.es*.

Eblas Senpagaj Trajnbiletoj por ĉiuj ekskursoj! Kiam vi alvenos, vi povos rezervi kvar-monatan trajno-bileton por vojaĝi fervoje en la lokaj trajnoj de la provinco Valencio. La rezervo-pago estas nur 10 €, kiun vi rehavos se vi faras nur 16 vojaĝojn iam ajn dum periodo de kvar monatoj. Vere bona ŝanco por ne-valencianoj, kiuj volas koni la kulturon kaj gastronomion de Valencio, kies ĉef-urbo elektiĝis lastjare kiel la plej bona loko por loĝi en Eŭropo (InterNations kaj Forbes Magazino).

Vi povas veni. Vi povas viziti. Vi povas valencii.




*Dennis KEEFE*
*LKK de Valencio, Cheste (https://kongreso.esperanto.es/)*

# Madagaskaro

## Sukcesa seminario pri Esperanto-instruado en Antananarivo

32 partoprenantoj de Madagaskaro ĝoje ĝuis la belecon de nia Eo. La seminario pri Eo-instruado okazis de la 4-a ĝis 6-a de januaro 2024 en Antananarivo Madagaskaro. La seminario havis du kategoriojn de aktivaĵoj: la por-instruista trejnado kaj la lingva instruado.




Unue, ni trejnis kvar gejunulojn. Ni faris tiun instruistan trejnadon por provizi sciojn kaj kapablecon por gvidi kursojn de Eo al komencantoj. Niaj celitoj estis kursfinintoj de la 38 bazaj lecionoj laŭ la instruprogramo de UME. Ni havis por Plenumado mallongajn teoriojn pri instruado, seancon de instru-provado sen lernantoj kaj praktikajn kursojn kun veraj komencantoj.

Due, ni instruis E-on al 25 komencantoj inter 11- kaj 40-jaraĝa. Ni instruis ilin per lernant-partoprenigo, per ludo, per kanto. Trejnitaj instruistoj praktikis kun la veraj komencantoj.

Atestiloj estis disdonitaj al la kvar trejnitoj kaj al gelernintoj, kiuj sukcesis la skriban teston kaj parolan teston.

Dume, ni informis al ĉiuj pri la UK 2024 en Aruŝo, pri UEA kaj ĝiaj sekcioj. Ni havas novajn membrojn: 20 membrojn en AME (Asocio de Malagasaj Evangiliistoj, KELI sekcio), 9 membrojn de MUKE (Malagasa Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj, sekcio de IKUE), 22 membrojn de MEVA

(Malagasa Esperantista Virina Asocio), 23 membroj de MEJA (Malagasa Junulara Esperanto-Asocio) kaj ĉiuj aniĝis en UME (Unuiĝo de Malagasa Esperantisto), nia landa asocio. Nia landa asocio refunkcias kaj jen la konsisto de nia nova estraro:

La prezidantino: S-ino RANJA Arc Lydie (La Verda Insuleto de Esperanto en Anosibe)
La sekretariino: F-ino RAVOLOLOMAMPIONONA Tatiana (Itaosy Eo-Klubo)
La kasistino: F-ino ANDRIANIRINA Manohimiharitsara (Itaosy Eo-Klubo)
La gekonsilantoj:

- F-ino FELANIAINA Rovasoa Erica (Itaosy Eo-Klubo)
- S-ro RAKOTOSON Tolojanahary Fabrice,(Eo-klubo La Suno en Toamasina)
- S-ino RAZAFINDRABE Farahasina (La Verda Insuleto de Esperanto en Anosibe)
- F-ino ANDRIANAMBININTSOA Ny Hasina (Eo-Klubo en Analamahitsy)
- Honoraj membroj: S-ro FIDILALAO Henriel (Itaosy Eo-Klubo)
- kaj Pastoro D-ro RAVELOHARISON Miora (Esperanto-Klubo en Analamahitsy)

Mi ĝojas kundividi al vi niajn seminariajn efikojn: nia Landa Asocio UME kaj ĝiaj sekcioj agadas denove. Kvar novaj instruantoj pretas labori kaj disvastigos Esperanton. Niaj gelernantoj daŭrigas lernadon de Esperanto kaj volas sciigi ĝin al aliuloj. Unu el la religiaj fratinoj, kiuj gastigis nin, komencis lerni Esperanton.

**Nia defio**

Havi regulan agadon por motivi niajn membrojn kaj informi Malagasojn pri nia lingvo. Ni deziras vian kunlaboradon, vian moralan, materialan kaj financan subtenon por la disvolvo de nia agado. Ni deziras havi vian subtenon por partoprenigi kelkajn malagasajn esperantistojn al la UK 2024 en Aruŝo.

Ni organizis kristanan seminarion kaj virinan agadon de la 7-a ĝis 9-a de marto 2024 en Antananarivo.

Ni estas tre dankemaj al vi pro viaj subtenoj kaj pro tio, ke vi konsentis kunlabori kun ni por alporti plibonigojn de nia agado en Madagaskaro. Ni estas ĉiam pretaj por ajna kunlaboro.

*RAVELOHARISON Miora, le.myrhe@gmail.com*

# Senegalo

### El la jarraporto pri 2023

En Senegalo, en 2023, Esperanto-kursoj estis faritaj dumaniere, ĉeeste dum la unuaj du monatoj kaj per Vacapo, poste: s-ro Kossi WOUDJI sendis lecionerojn ĉe la Vacapo-platformo (teoria kurso), kaj s-ro Lafi Charles DIATTA gvidis vacapajn babiladojn (praktika kurso).
Kvankam neniu senegalano partoprenis UK-on, nek la kongreson de ILEI, Senegalo ricevis, de Julio (Brazilo), librojn donitajn de ties partoprenantoj; senegalanoj dankas pro tio.
Plej notinda evento de la jaro 2023, cele al diskonigado de Esperanto en Senegalo, estis partopreno de Senegala Esperanto-Asocio en libro-ekspozicio, kiu okazis de la 15-a ĝis la 18-a de novembro 2023 en la kultura centro Blaise Senghor de Dakaro. Deĵoris, dum tiu kvartaga okazaĵo, 4 membroj de la landa asocio (Thierno BA, Assane FAYE, Kossi WOUDJI, Lafi Charles DIATTA).
Rilate al tiu evento, la senegala movado ege dankas al s-ino Martina Sachs-Böckelmann (Germanio), s-ro Ivano Kossey (Germanio) kaj s-ro Aziz Diallo (senegalano vivanta en Usono) pro ilia pozitiva reago aŭ ilia subteno.
Dum tiu evento estis disdonitaj tekstaj prezentaĵoj de Esperanto, al pli ol cent homoj. Sed ankaŭ kvina parola prezento pri Esperanto estis farita de Lafi Charles DIATTA, al la publiko. Ĉiutage, dum la ekspozicio, deĵorintoj diskutadis kun vizitantoj kaj prenis iliajn kontaktadresojn.

*Lafi Charles DIATTA*

# Serbio

### Interkulture kaj inkluzive en Beogrado aŭguste

Serbio, kun sia geografia kaj historia situo inter la Oriento kaj la Okcidento,
Serbio, kun sia geografia kaj historia situo inter la Oriento kaj la Okcidento,
en la sudo de la Nordo, estis kaj estas interkruciĝejo de vojoj: popolmigraj, ekonomiaj, kulturaj, militaj kaj pacaj. Tial ĝi estas alloga okazejo de esperantistaj renkontiĝoj. Beogrado, la antikva Singidunum kaj moderna ĉefurbo de Serbio, gastigos en la semajno 2024/08/17-24 esperantistojn el najbaraj kaj foraj landoj, kiuj diskutos siajn movadajn temojn, planos komunajn projektojn, trejniĝos pri inkluzivo kaj interkultureco en lingva edukado, ĝuos Esperanto-kulturan programon kaj konatiĝos kun spuroj kaj nunoj de la agitiĝema historio kaj tradiciriĉa kulturo de la gastiganta lando.

La eventon kunorganizas: Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kun sia Instruista Sekcio (ILEI-RS) kaj Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE). La tutsemajnan programon konsistigos:

- La 88-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) kun prelegoj kaj aliaj kongresaj laborformoj. Ĉefteme oni diskutos pri planlingvoj kaj la rolo de Esperanto kiel ponto inter diversaj kulturoj. Oni aŭskultos prelegojn pri „Raymond Schwartz - laŭ mia... ridpunkto", pri la egipta hieroglifa skribo, interkulturaj spertoj de instruistino de la hispana, lernos iom pri la franca lingvo, povos perfektiĝi pri Esperanto dum ĉiumatena konversacia rondo k.c. Pliaj kontribuproponoj venadas de la aliĝantoj.
- IKK-seminario de SEL/UEA: Trejnseminario pri interkultura komunika kompetento, instrukapabligo kaj aktivula lertigo sub gvido de Duncan Charters, Francesco Maurelli, Sara Spanó kaj aliaj fakuloj.
- Tagoj de ILEI – regiona renkontiĝo de instruistoj kaj ILEI-anoj de Balkanio kaj malsupra Danubio: Post la ekscita ILEI-kongreso en Maceio, Brazilo, 2024/07/20-27, kun sufiĉa tempa kaj geografia distanco, esperantistaj instruistoj de la regiono utiligos la eventon en Beogrado por plani plifortigon de la ILEI-agado en ĉi tiu mondoparto.
- Balkanaj tagoj – kunveno de esperantistoj el Balkanaj kaj najbaraj landoj: Enkadre de la Eŭropa komisiono de UEA, de monatoj funkcias Balkana kunlaborgrupo, kiu retkunsidas unu fojon ĉiumonate por interŝanĝi informojn kaj interkonsenti kunagadojn. Dum la ĉeesta kunveno estos pli konkrete traktataj planoj pri kelkaj regionaj projektideoj, ekzemple: Balkana itinero, Panoniaj tagoj, Danubo – komunikvojo de Eŭropaj valoroj.
- Komuna arta, distra kaj ekskursa programo

Ĉio ĉi estas alirebla per unu aliĝilo kaj kontraŭ unika tutsemajna kotizo. La aliĝilo atingeblas tra Eventa servo (*eventaservo.org*) aŭ Novaĵoj de *ilei.info*. Pli detala programo kun konkreta horaro estos prezentata tra koncernaj retlistoj kaj aliaj komunikkanaloj.

**La IKK-seminario**

La trejnseminarion finance subtenas Erasmus+, UEA kaj ILEI. Ĝi realiĝas enkadre de Erasmus-projekto de SEL kaj de la UEA-agado: 2024 – La Jaro de Interkultura Komunika Kompetento. Ĝi enfokusigas la bazan intereson de

ILEI pri instrukapabligo kaj bezonojn de SEL kaj aliaj E-organizoj pri aktivula plilertigo.
Per la subvencioj de UEA kaj ILEI, minimume 12 seminarianoj ricevos stipendion por la partopreno laŭ la stipendikonkurso publikigita inter Novaĵoj de *ilei.info*. La seminario restas malferma por pliaj partoprenantoj sen stipendio aliĝintaj al la evento. La subvencio de Erasmus+ kaj parte tiu de UEA kovros la kostojn de seminarigvidantoj.
La seminario daŭros entute 30 horojn (la ekskursa tago estos libera) kaj ampleksos diversajn temojn por instruista kaj aktivula trejnado traktatajn tra prelegoj, atelieroj kaj laborgrupoj:

- Interkultura komunika kompetento (IKK)
- Instrumetodiko de Esperanto kun specifa emfazo de la interkultura aliro kaj inkluzivigo
- Aktivula trejnado pri:
    - projektmastrumado
    - planado de partneraj projektoj
    - organizado kaj mastrumado de eventoj
    - subvencipetado
    - retkomunikado
    - rilatoj kun amaskomunikiloj
    - komunikiĝo kun ekstermovadaj institucioj kaj instancoj
- Unuaj paŝoj al trejnado de trejnistoj

Studekzemploj por seminariaj atelieroj kaj laborgrupoj estos la projektideoj por balkana kunlaboro, menciitaj ĉi-supre, kaj internaciaj eventoj organizeblaj en la regiono, ekzemple: ILEI-kongreso 2025 (pripensata en Serbio), IFEF-kongreso 2026 (jam interkonsentita okazi en Serbio) kaj similaj, ne nur en Serbio.

**La Kongresejo**
La eventon gastigos la Lernejo por lernantoj kun difektita vidkapablo en Zemun (parto de Beogrado proksima al la flughaveno), Serbio. La vasta bele ordigita korto, aranĝita por senobstakla moviĝo de blinduloj, proponas agrablan spacon por promenoj, kunumado kaj babilrondoj meze de la urbo, tamen for de la urba bruo. La tutsemajna kotizo de 270 EUR inkluzivas:

- ĝuon de la programo inkluzive de ekskurso
- loĝadon en komfortaj trilitaj ĉambroj organizitaj en triĉambraj loĝblokoj kun komunaj banĉambro, necesejo, tagĉambro, te-kuirejo kaj sendrata retkonekto
- tri manĝojn ĉiutage

Se vi deziras loĝi kaj manĝi aliloke, vi pagos nur la bazan kotizon de 50 EUR kaj povos trovi ĉambron en proksimaj hoteloj aŭ gastejoj traserĉeblaj rete.

**La respondeculoj**
Por pliaj informoj, komentoj, proponoj skribu al la ĉefrespondeculoj:
Pri la tuta evento:

Nedeljka Loĵajiĉ <nedeljkalozajic@gmail.com>, prezidantino de LIBE, vicprezidantino de SEL
Jovan Zarkoviĉ <zarkovicjovan@gmail.com>, prezidanto de SEL

Pri la ILEI-rilataj eroj (IKK-seminario kaj Tagoj de ILEI):

Radojica Petroviĉ <radojica.petrovic.rs@gmail.com>, estrarano de ILEI, kunordiganto de la Erasmus-projekto de SEL
Aranka Laslo <laslo.az@gmail.com>, sekciestrino kaj komitatano de ILEI el Serbio, kontakt-persono de SEL ĉe Erasmus+

Bonvenon!


*Radojica PETROVIĈ*

## Ĉu afrikanoj parolas afrikajn lingvojn?

Ne demandu pri tio la francan registaron aŭ instancojn en la anglalingva veziko. Ili diros al vi, ke en Afriko oni uzas la francan kaj la anglan, ĉar afrikaj lingvoj ne estas uzeblaj pro la multaj dialektoj, kaj ke Unesko estas kontraŭokcidenta organizaĵo, ĉar ĝi jam en 1953 aperigis libron, *The use of vernacular languages in education* [uzo de lokaj lingvoj en edukado], kiu klarigis, ke tio estas mensogoj de la ekse kaj daŭre koloniaj registaroj, por ligi la afrikanojn al si.

Tamen la afrikaj politikistoj dum jardekoj pli kredis al la eksaj koloniistoj ol al Unesko kaj malŝparis afrikan monon por aĉeti franclingvan kaj anglalingvan edukan materialon kaj edukadon de instruistoj kaj torturis afrikajn infanojn [imagu, ke via sesjara filo morgaŭ matene ekiras al lernejo, en kiu oni alparolas lin en la araba]. Samtempe dum jardekoj la Internacia Mona Fonduso diris al registaroj: „Ĉu vi volas tiun prunton por konstrui lernejojn? Ni certe donos ĝin al vi, se vi instruos en tiuj lernejoj en modernaj ekonomie utilaj lingvoj.” Tio ĉesis nur antaŭ malmultaj jaroj.

Sed oni povas trompi unu homon dum la tuta vivo aŭ multajn homojn dum mallonga tempo.  Post 60 jaroj la mensogoj komencis aperi kiel mensogoj




kaj la afrikaj registaroj tre singarde komencas eksperimenti pri afrikaj lingvoj.

Kaj ankaŭ esperantistoj, kiuj dum jardekoj dividis afrikajn landojn en franclingvajn kaj anglalingvajn landojn, devas komenci rigardi la realaĵon. Tio jam okazas pri la orientafrika lingvo la sŭahila. Ankaŭ danke al la Universala Kongreso en Aruŝo, multas la iniciatoj pri lernolibroj de Esperanto en la sŭahila, antaŭ la decido pri tio, ĉu oni diru svahila, suahila aŭ sŭahila.

Sed tre malpli floranta estas la situacio pri la okcidentafrikaj lingvoj, ekzemple pri la fonua, parolata en la lando de la benina landa sekcio de ILEI kaj en la najbaraj landoj de 3 milionoj da parolantoj, izola lingvo kun tonoj, la volofa sentona, sed parolata de 10 milionoj da homoj ĉefe en Senegalo, alia lando kun ILEI-sekcio.
Kaj kion diri pri la haŭsa, apartenanta al alia lingvogrupo, afrik-azia familio, kaj subfamilio de la ĉadaj lingvoj, parolata de proksimume 50 milionoj da homoj en Niĝerio kaj najbaraj landoj.
Bonŝance pri ĉi tiu lingvo komenciĝiss aperi enkonduka verko, la vortaro haŭsa-esperanto de itala lingvisto-esperantisto, Sergio Baldi, profesoro pri la haŭsa en la universitato de Napolo, kies kovrilon ni prezentis ĉi tie.

***Sergio Baldi.*** *VORTARO HAŬSA-ESPERANTO kaj ESPERANTO-HAŬSA.* *Red. Renato Corsetti. MONDIAL, 2024*

Ĝi estu la unua de longa serio.

*Renato CORSETTI*

# Por via notlibro

## Senpagaj retaj provekzamenoj de edukado.net




Danke al edukado.net, ESF, UEA, landaj asocioj de Francio, Britio kaj Usono, kaj al donacoj de kelkaj individuoj, edukado.net povos disponigi **senpagajn retajn provekzamenojn** al ĉiu interesiĝanto.

La testojn eblas solvi kiam ajn en la jaro 2024, sed oni konsilas fari tion antaŭ la juniaj retaj ekzamenoj.

Oni rajtas provi sin je du najbaraj niveloj. Post la solvado de la testoj la teamanoj de edukado.net ene de du tagoj korektas la testojn kaj la solvinto

povos vidi siajn rezultojn, erarojn, eĉ ricevas tekstan konsilon pri farendaj ekzercoj kaj pri la ekzamennivelo, kiun la kandidato kun bona ŝanco povus sukcese trapasi.

La kampanjo ekis meze de marto, kaj ene de unu monato jam 75 personoj petis eblon provi entute 120 ekzamenojn, kiuj signifas 195 lingvajn testojn kaj 75 teknikajn kontroltekstojn. Multaj el la provintoj decidis trapasi KER-ekzamenon en junio.

Pliajn informojn serĉu kaj aliĝu pere de la reta formularo, trovebla en la paĝo https://edukado.net/ekzamenoj/ker/provekzamenoj.

*Katalin KOVATS, redaktanto de edukado.net*

## Maturigo kaj mondokono

La programo de Aktivula Maturigo (AMO) disvolviĝas tra 2024. AMO-seminario 108 okazis februare en Kroatio pri Amikeco, AMO 109 okazis en Kubo aprile pri Amerika kunlaboro kaj AMO 110 okazos en Pollando maje pri la projekto Erasmus+. Septembre okazos seminario en Albanio pri instruado, nova lando por la AMO-programo. Sammonate la Hispana Kongreso akceptos AMO-seminarion kun partopreno de Duncan Charters kaj Dennis Keefe, pri eduka temo. Oktobre okazos seminario en Kulturcentro Greziljono pri junulara temo. Novembre gastigos refoje la tradicia kroata seminario pri libroj kaj literaturo.

Jen la fino de la certaj seminarioj; multaj pliaj ideoj flosas en la movada fluso. Ni ankoraŭ esperas pri seminarioj kadre de la Kongreso de ILEI en Maceio (Brazilo) julie kaj la UK en Aruŝo aŭguste. Sen asignita monato: ni luktas sukcesi per seminarioj en Armenio, Ĉinio kaj Kanado.

ILEI montras refoje sian kuraĝon kaj avangardismon. Ĝi prenas gvidan rolon en la projekto Landa Parad' (LAPA), kiu instigas niajn aktivulojn pli bone koni nian mondon kaj la Eo-movadon en tiu kunteksto. LAPA dividas la mondon en sep partojn, du el kiuj estas preskaŭ pretaj: pri la regiono 'MONA' (Mez-Oriento kaj Norda-Afriko) kaj 'Pacifiko' (Aŭstralio, Nov-Zelando, Kanado, Meksiko kaj Usono). Ili aperos frue en majo ĉe ILEI, kiu apogas la projekton kune kun IFEF (fervojistoj) kaj IKEF (komercistoj). La raportoj pri la ceteraj mondpartoj sekvos sinsekve poste en la jaro.

*Stefan MACGILL*

## Intervjuo al „Esperanta Ponto”

*intervjuis: Alessandra Madella (Italio)*

Nakajima Miki, Kawara Hiro kaj Satō Ryūsuke estas la koraj membroj de „Esperanta Ponto”, grupeto de japanaj gejunuloj, kiuj fondis la samnoman kanalon en Jutubo, notindan pro sia teknika kvalito kaj la mojosaj enhavoj. Ili afable konsentis paroli kun IPR pri siaj ideoj kaj projektoj, inkluzive de kunlaboro kun ILEI.

**Nakajima Miki, Kawara Hiro kaj Satō Ryūsuke: EP**
**Alessandra Madella: AM**

*AM: Ĉu vi bonvolas diri al ni ion pri viaj fono kaj profesiaj spertoj?*

EP: „Esperanta Ponto” konsistas ne nur el ni tri, sed el la amikoj ĉeestantaj en unuopaj aranĝoj. Ĉiu el ili havas apartajn talentojn, do ne eblas mencii iun komunan fonon. Sed pri profesiaj spertoj certe menciindas, ke Miki estas reĝisoro de programo de la japana televido NHK.

*AM: Kiel vi kunlaboras kun Japana Esperanto-Instituto?*

EP: Ni produktis prezentan filmeton de JEI.
https://www.youtube.com/watch?v=UwiGrAQf1wc

*AM: Kiel vi decidis malfermi la jutuban kanalon „Esperanta Ponto”?*

EP: Ni malfermis ĝin por okazigi eventon ĉe la Japana Esperanto-kongreso.
https://www.youtube.com/watch?v=wMsMuteUjK4

*AM: Kiel vi priskribus ĝiajn ĉefajn agadojn/interesojn?*

EP: Ni estas grupo, kiu elsendas Esperantan projekton el Japanio.
Niaj kromaj agadoj inkluzivas prezentadon pri Esperantaj eventoj kaj Esperantaj libroj, ktp!

*AM: Kian publikon vi celas?*

EP: Bonvenaj estas ne nur homoj interesataj pri Esperanto, sed ankaŭ homoj interesiĝantaj pri ludado, lingvoj ĝenerale, pensoj kaj tiel plu.
Do nia agado ne vere havas ian fokuson pri publiko. Tamen homoj similaj al ni nepre trovos ion interesan. Ni celas larĝigi la enirejon.

*AM: Kiujn konsilojn vi donus al ILEI por mojosigi vivelsendojn?*

EP: Ni pensas, ke prezento de nature sentataj interesoj de prezentantoj estas la plej grava. Ĝi estas alloga kaj la plej sukcesa mojosigo.
Temas ankaŭ pri teknikoj: en nia projekto „Krokodilo", ni provis kombini komunikil-specojn: libron kaj elsendojn. Tio estis sukcesa por pli larĝe interesigi homojn.
Ankaŭ elsendoj kun diversaj homoj kreos multfacan amuzon por la spektantoj.

*AM: Kiel la libroj, kiujn vi eldonas, uzeblas por instruado?*

EP: Ni pensas, ke instruistoj de Esperanto povus utiligi la librojn. Gvidanto prenos la rolon de ludo-mastro, kaj lernantoj legos, diskutos kaj respondos demandojn en Esperanto. Tio estas tre praktika metodo de instruado.

*AM: Kiel vi vidas vian kunlaboron kun ILEI?*

EP: Nia filmeto pri Komuna Seminario inter orientaziaj E-junularoj jam troviĝas sur la Jutubo-kanalo de ILEI. Jen la ligilo: https://www.youtube.com/@esperantaponto2238/playlists.
Krome, ni planas krei prezentan filmeton pri Esperanta Ponto por aperigi ĝin sur la kanalo de ILEI. Ni deziras fari pli da kunlaboro kun ILEI per Jutubo!

*AM: Kiujn estontajn projektojn vi havas?*

EP: Miki nun konservas ankoraŭ ne tuŝitajn video-materialojn pri Kulturdomoj de Esperanto: la Kastelo Greziljono en Francio kaj Esperanto-Domo de Jacugatake en Japanio. Kiam la video estos finata, ni alŝutu ĝin.
Krome kiam al ni venos iu amuza ideo pri filmado, ni anoncos pri tio!

## INFORMOJ PRI ILEI

### Laborkomisionoj

**Ekzamena**: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
**Elekta:** Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
**Kontrola:** Simon Smits, Nvard Manveljan.
**Lerneja:** Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Oberrauch, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
**Regulara:** Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.

**Terminara:** Miroslav Malovec, Ilona Koutny.
**Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

## Enmovadaj partneroj (entute 15)

**E@I** (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*
**Fondaĵo edukado.net** - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*
**ICH** (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*
**IFEF** (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*
**TEJO** (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**
**UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**
**LIBE** (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, *nedeljkalozajic@gmail.com*.
*kaj aliaj*

## Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

**ALTE** *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.
**FIPLV** *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*
**UN** (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**
**Unesko** (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.
*kaj aliaj*

## Membreco kaj pagado por diversaj servoj

**Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €.** Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj

Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatuo en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELJAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de via sekciestro aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).
* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

## REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, tel*: (+36-70) 931-0530*. Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.
**La adreso de nia nova arkivo: https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php.**
*Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aprilo 2024,*
*redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aŭgusto 2024.*




*„Esperanta Ponto” en Tokio (Japanio) (vd. p. 36)*

